# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO


**N° 216 APRILO 2003**

La numero : 2 euroj Abono: 7 € Kotizo: 3 € Sume: 10 €

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-*a, preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

| **Motif de non distribution** | Périodique Semi-routé |
| --- | --- |
| ☐ Adresse insuffisante | **PORT PAYE** |
| ☐ N'habite pas à l'adresse | COLMAR (68) |
| ☐ Refusé | |
| ☐ Autres | |

LA POSTE
DISTRIBUÉ PAR
PRESSE
P
COLMAR
Dispensé de timbrage

## Surkovrile

La emblemo de la ĉijara internacia katolika esperanta kongreso kaj de la kristana esperanto ligo (KELI)
kiu okazos en Rimini .

.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 31.a de junio 2003. Venonta bulteno aperos komence de julio .

Finpresado la 10/04/2003


*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 216 Aprilo 2003**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro HEROUX
Maison St-Joseph
26400 ALLEX

Peranto IKUE:
S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL

<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com


# Le Mot du Président

C'est la dernière fois que je rédige, en tant que président, le petit mot qui ouvre traditionnelement chacun de nos bulletins. En effet, après 14 ans de présidence, j'ai décidé de ne pas me représenter à vos suffrages et de laisser la place à un nouveau président , plus jeune et plus dynamique.

L'âge est là et , avec lui, le manque de vitalité et d'idées neuves. Ce sera donc un avantage pour l'association d'avoir un nouveau président qui aura une vue différente des choses et donnera un nouvel élan à nos activitées.

Au cours de ces 14 années écoulées, notre association a connu des temps forts grâce à des personnalités qui ont marqué notre action, telle Madame Vincent.

A vous tous qui m'avez aidé par votre action ou vos conseils, je veux exprimer aujourd'hui ma reconnaissance et dire combien j'ai apprécié l'aide et la confiance que vous m'avez témoigné tout au long des années passées au service de l'association.

A l'heure où j'écris ces lignes, j'ignore encore qui me succédera à l'issue de notre prochaine Assemblée Générale. Quel que soit celui ou celle qui prendra ma suite, je ne doute pas que vous saurez lui apporter votre appui pour porter témoignage de notre Foi dans les milieux espérantistes et aider à promouvoir la langue internationale.

Laisser la place à un autre ne signifie pas que je me désintéresse de l'avenir de l'association , à laquelle je reste fidèle. Ce sera mon plaisir de voir mon succésseur pérénniser notre action.

# La Bileto de la prezidanto

Estas la lasta fojo, ke mi verkas, kiel prezidanto, tiun bileton, kiu tradicie, staras komence de nia bulteno. Ja post 14 jaroj, de prezidanteco, mi decidis ne rekandidatiĝi kaj lasi la postenon al nova prezidanto, pli juna kaj pli agema ol mi.

Mi fariĝis maljuna kaj, kune kun la aĝo, venis malhavo de vivoforto kaj novaj ideoj. Havi novan prezidanton kun malsimila rigardo al la problemoj, tio alportos avantaĝon al la asocio kaj antaŭenpuŝos ĝin.

Dum la 14 pasintaj jaroj , nia asocio konis intencajn momentojn dank'al rimarkinduloj, kiuj ŝtampis nian agon, kiel S-ino Vincent.

Al vi ĉiuj, kiuj helpis min per viaj agoj kaj konsiloj, mi hodiaŭ esprimas mian dankemon kaj asertas vin, kiom mi ŝatis la helpon kaj fidon, kiujn vi montris al mi dum la daŭro de la jaroj pasitaj je la servo de la asocio.

Kiu ajn li aŭ ŝi estos, mi ne dubas, ke vi volonte alportos al li aŭ ŝi vian subtenon por atesti pri nia Fido en la esperantistaj medioj kaj helpi en la promocio de la internacia lingvo.

Lasi la postenon al aliulo, tio ne signifas , ke mi malinteresas pri estonteco de la asocio, al kiu mi restas fidela . Vidi mian posteulon longdaŭrigi nian agadkampon, tio estos por mi plezuro.

# Proponi sinceran Pardonon

Patro, nenio estas pli malfacila
Ol proponi sinceran pardonon,
Precipe al tiuj,
Kiuj estas proksimaj al ni
Kaj reale suferigis nin.
Kiom malfacila estas tiu ĉi pardono !

Tiom da pretekstoj tumultas
En nia kapo:
Ĉu mi mem devas komenci ?
Ĉu tio valoras ?
Ne, mi ne volas nun ;
Morgaŭ eble ?
Pardoni multe kostas al mi.
Ĉu eĉ eblas ?
Patro, ni scias tion:
La repaciĝo kaj la pardono
Povas veni nur el Vi.

Tial akordu al ni
La gracon pardoni,
La forton repaciĝi
Kun niaj samloĝantoj,
Kun niaj malproksimuloj
Kun nia forkurinta edzo,
Kun nia filo, kiu ne plu interrilatas kun ni.
Igu niajn malamikojn.
Ne permesu
Ke la suno subiros,
Kiam venĝemo aŭ kolero
Staras en niaj koroj.
Instigu nin fari la unuan paŝon
Kaj ni estos similaj al Vi.

Kardinalo Godfried Danneels

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 21-AN DE JANUARO 2003 EN PARIZO.

Ĉeestis: S-ro Bessière, S-inoj Abada-Simon kaj Lafargue, F-ino Chaney, P° Héroux, S-roj Chevalier, Pons, Villeneuve kaj Texier (reprezentanto de Espéranto-France)

Petis senkulpigon: F-inoj Hervier kaj Michel.

Post la recitado de la Venu Sankta Spirito kaj de la Patro Nia, s-ro Villeneuve raportas pri la financoj .

La komitato aprobas la programon de la venonta kongreso en Notre-Dame du Chêne .Pastro Girault prelegos pri la rilatoj inter la ĉefaj religioj: Kristanismo, Islamo, Buddhismo kaj Hinduismo.

La preparo de la venonta ĝenerala kunveno estis farita. S-ro Simonet kandidatiĝis por eniri la komitaton, kiun forlasas S-ro Bessière . Ĉiu membro ricevos leteron, kiu invitos lin al voĉdonado.

La asocio planas diservon en Parizo komence de oktobro . Pastro Héroux zorgos pri ĝi, kun la helpo de la sekretariino .

La venonta komitatkunveno okazos en ND du Chêne jaŭdon la 28-an de majo 2003 je 14 h.

## *EN NIA ASOCIO*

Novaj membroj 2003:
- S-ino GRIMBERT (95)
- Abbé DE BODARD (72)
- S-ro DUFOUR (Kanado)

Bonvenon al la genovuloj.

## KALENDARO

28/05 ĝis 01/06 — BERLINO (Germanio)
1-a Ekumena Eklezia Kongreso
La kristanaj esperantistoj de IKUE kaj KELI, kunlabore kun Germana E-Junularo, havos propran standon dum la tuta aranĝo.

19/07 ĝis 26/07 — SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomy
21-a IKUE E-Tendaro
Oni dormas en 2-litaj bonkvaliataj tendoj. Prezo tre malalta 35 eŭroj.

30/08 ĝis 06/09 — RIMINI (Italio)
16-a Ekumena Kongreso
56-a IKUE Kongreso
53-a KELI Kongreso

Movada Informo: La Togolandaj Katolikaj Esperantistoj ankaŭ eldonas bultenon : "Dia Vorto"

**16-a Ekumena Kongreso**
**56-a de IKUE - 53-a de KELI**
**30 auxgusto - 6 septembro 2003**
**en Rimini, Italio**

kune kun la
6-a JET 2003

( 6-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro )

Ni volas kune kristane vivi, preĝante por plia kreskado de unueco inter la gefratoj de Jesuo Kristo. La 16-a EEK okazos en Rimini honore al pastro Magnani, honora prezidanto de IKUE. Li ornamis ties esperantan preĝejon Sanktaj Johano kaj Paùlo kun ties Esperanto-mozaikoj. Post la kongreso, pastro Magnani emeritiĝos. Nia kongreso EEK estos la kronigo de la esperanta agado de pastro Magnani.

**Ni kongresos en Rimini, Italio.** La historio de Rimini estas antikva kiel la historio de Romo. Ĉi tie fluas la rivero Rubikono (Rubicone), konata pro la fama transiro kaj eldiro de Julio Cezaro. En ĉi tiu regiono renkontiĝis la Romia kaj la Bizanca kulturoj. El tiu kultura renkontiĝo estiĝis la imponaj mozaikoj de Ravenna, kiuj ĝis hodiaù influas la artajn laborojn de la regionaj artistoj. Tion ekzemple pruvas la interesaj Esperanto-mozaikoj de la kongreseja pregxejo Johano kaj Paulo en Rimini.

**Temo** de la kongreso estas: Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1,8; ADORU 560 ), salo kaj lumo por la mondo (Mat 5,13+14).
ADORU estos la libro ĝenerale uzata en la 16-a EEK. Posedantoj kunportu sian ekzempleron. Oni povas aĉeti la libron dum la kongreso.

Oni atentu **la speciale favorajn prezojn por familioj kaj grupoj.** Tio estas la ŝanco, kunvenigi konatajn gejunulojn kaj familiojn al nia kristana Esperanto-renkontiĝo. Estas antaùkondiĉo, ke la gejunuloj kaj infanoj jam antaù la kunveno komencis lerni Esperanton. Tion konfirmu antaue grup-gvidanto aù gepatroj.

La kotizoj inkluzivas ekskurson al Ravenna kun siaj famaj preĝejaj bildoj kaj al San Marino, la plej malnova respubliko de la mondo.

*La Ekumena Komisiono invitas al nia 16-a Ekumena Kongreso Rimini 2003*
*Adolf BURKHARDT por KELI*
*Bernhard EICHKORN por IKUE*
*kaj nome da la Loka Kongresa Komitato: Duilio MAGNANI*

## ALIĜILO

En Rimini ni kongresos en la preĝejo kaj paroho S-taj Johano kaj Pauxlo, Viale Carlo Zavagli 73, ĉirkau 2 km norde de la ĉef-stacidomo de Rimini.

Ni ĉiuj loĝos en diversaj du-stelaj (**) aù tri-stelaj (***) hoteloj, kiuj en Rimini abundas. Ni elektos hotelojn plej proksimajn al la kongresejo (maks. 15 minutojn da pied-irado).
**Kongresaj kotizoj**

Tarifo A: Ĉiuj landoj sen B. **Tarifo B:** Eùropa Unio, Skandinavio, Svisio, Nord-Ameriko

1. Kongresa aliĝ-kotizo (ne repagebla) por ĉiu persono, ankaù por JET-anoj:

ekde 1.4.2003: A: 40.- EUR; **B: 70.- EUR**

La aliĝo validas, se la aliĝ-kotizo estas pagita.

2. **Hotelaj prezoj** (7 noktoj + matenmanĝoj kaj 7 tag- + vespermanĝoj 30.8.-6.9.matene)

(ĉiam por unu persono, pagenda en la kongreso)

| Hoteloj | cxambro 1-lita | cxambro 2-lita | cxambro 3-4-lita |
|---|---|---|---|
| Du-stelaj | 250 EUR | Landoj A: 180 EUR<br>Landoj B: 210 EUR | Landoj A: 160 EUR<br>Landoj B: 190 EUR |
| Tri-stelaj | 380 EUR | 310 EUR | -------- |

(Ni subvencias grupojn el B-Landoj en 2-stelaj hoteloj)

3. **Familioj** por 2-stela hotelo en kuna aŭ en du parencaj ĉambroj, kostoj kiel sube 4.1.

4. **JET' 2003-anoj** loĝos en samaj domoj. Ili havas parte propran junularan programon. La plenaĝaj respondeculoj loĝas en la hotelo de de sia grupo kaj helpos en la porjunula programo aŭ zorgas pri la infanoj.

4.1. Hotel- + manĝo-prezoj **grupoj/familioj 3 - 5 personaj** (= 1 plenkreskulo aŭ 2 gepatroj kaj 2-4 infanoj/gejunuloj ĝis 25 jaraj) en samaj hoteloj:
Landoj A: 275 EUR; Landoj B: 340 EUR

Do en 5-persona grupo/familio por ĉiu oni pagos Landoj A = 55 EUR; B = 68 EUR +aliĝkotizo.

4.2. **Gejunuloj sen grupo ĝis 25jaroj:** Landoj A: 90 EUR; Landoj B: 120.- EUR

# Programo: (ne kompleta)

***Sabato, 30.8.03:***

- alveno. Interkona vespero .

***Dimanĉo, 31.8.03:***

- Diservoj kun Esperanto
- 9h00 kunveno en la kongresejo (preparo por la Diservoj)
- 11h00 sankta meso en la preĝejo Johano kaj Paŭlo
- 14h30 rozario en la preĝejo (libervole)
- 15h00-15h45 kantado en la kongresejo
- 16h00-17h00 ekumena Diservo en la preĝejo
- 17h15-19h00 inaŭguro de la kongreso en la kongresejo
- 21h00-21h40 Albrecht KRONENBERGER: "La vivo de Max Josef METZGER (Maks Jozef Mecger)"
- 21h45-22h25 Carmel MALLIA: "La spirita itinero de pastro DUN KARM (1971-1961), la malta poeto, en lia epiko: La "Mio" kaj Lia Pretero, estis ekzistencialista itinero"

***Lundo, 1.9.03:***

- 7h00 sankta meso en la preĝejo (libervole)
- 9h00 ekumena matenpreĝo en la preĝejo
- 9h30-10h15 kantado en la kongresejo
- 10h30-11h45 Miloslav SVACEK: Prelego pri la kongresa temo.
- 14h30 rozario en la preĝejo (libervole)
- 15h00-15h50 klarigoj de la preĝejaj mozaikoj en la kongres-preĝejo fare de Duilio MAGNANI
- 16h00-17h00 Mons-ro Giovanni BALCONI: "Ravenna, ekumena renkontiĝejo de oriento kaj okcidento"
- 17h15-18h30: Zoltan ZOMHEGYI: Mezepoka art-historio de Nord-Italio kaj Ravenna, 2-a parto
- 21h00 Komuna kunsido de la du estraroj de IKUE kaj KELI (ne-publika)

*Mardo, 2.9.03:*

- 9h00-10h20 grek-katolika sankta meso en la preĝejo, celebrata de pastro Ignatiu DOBOS kaj kuncelebrantoj.
- 10h30-10h05 Eugen Alexandrowistch LALENKOW: "Rusaj ortodoksaj martiroj sub la ateisma komunista diktaturo"
- 11h15-11.50 ?? prelego pri San Marino
- 14h30 ekskurso al San Marino kun man-sakoj de pagitaj vesper-manĝoj. Reveno je noktiĝo

***Merkredo, 3.9.03:***

- 8h00 forveturo; tut-taga ekskurso al Ravenna kun man-sakoj de pagitaj tag-manĝoj
- 11h00 Sankta Meso libervola
- 11h00 Evangelia Diservo libervola
- 17h30 Reveturo
- 21h00 amuza vespero

***Jaŭdo, 4.9.03:***

- 7h00 sankta meso en la preĝejo (libervole)
- 9h00 ekumena matenpreĝo en la preĝejo
- 9h30-10h15 kantado
- 10h30 jarkunvenoj KELI kaj IKUE
- 15h00-15h45 Arne LUNDQUIST: "La vivo de Sankta Birgitta"
- 15h50-16h30 Siegried KRÜGER: "Dietrich BONHOEFFER (ADORU 490)"
- 16h45-17h30 Dr. Gottfried NOSKE: "Angelus SILESIUS"
- 17h45-18h30 Gabriel ANDA: "Miaj impresoj pri Eŭropo, post kvar jaroj da restado, aŭ: Eŭropo, vidita de Afrikano"
- 21h00-22h00? Ernst LEUZE: publika orgena koncerto (eble interŝanĝe kun alia vespero)
- 22h30 tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo

***Vendredo, 5.9.03:***

- 7h00 sankta meso en la preĝejo (libervole)
- 8h00 matenmanĝo en la hoteloj
- 9h00 ekumena Diservo en la preĝejo
- 10h30-11h05 Adolf BURKHARDT: "Paul SCHNEIDER, la predikisto de Buchenwald"
- 11h15-11h50 Riccardo LARINI "Pri la martiroj - la plej konvinka Ekumenismo"
- 14h30 rozario en la preĝejo (libervole)
- 15h00 libera posttagmezo
- 18h45 vespro en la preĝejo
- 19h30 vespermanĝo en la hoteloj
- 21h00-23h00 gaja adiaŭa vespero
- cx. 23h00 tagfina preĝo en la preĝejo Johano kaj Paŭlo kaj vojaĝ-beno.

**Sabato, 6.9.03:**

- ekde 6h30 matenmanĝo en la hoteloj
- 7h00 sankta meso en la preĝejo Johano kaj Paŭlo (libervole)

- 9.00 oficiala adiaŭo

## Pliajn informojn ĉe :

Adresoj de la Ekumena komisiono kaj de la LKK:

Adolf BURKHARDT, Gimpelweg 1, DE- 73235 Weilheim/Teck, fakso: + 497023 72413

Bernhard EICHKORN, Romausring 20,DE-78050 Villingen, fakso: + 49 7721 22074

Duilio MAGNANI, Viale Carlo Zavagli 73, IT 47900 Rimini RN, telefono/faksilo: + 39 0541 26447

## KIU ESTAS POR MI JESUO?

*La 19-an de oktobro de la nuna jaro okazos beatproklamo de Patrino Tereza el Kalkuto. Tre bele ŝi sin esprimis pri Jesuo. Ĉu ankaŭ ni perceptas Jesuon same kiel ŝi?*

### Kiu estas por mi Jesuo?



La Korpo naskiĝinta el la Vorto
La Pano de la Vivo
La Ŝafido oferdonita pro niaj pekoj sur la kruco
La Ofero sin doninta en la Sankta Meso
por la pekoj de la mondo kaj la pekoj miaj
La Vorto, kiun oni devas prediki
La Vero, kiun oni devas paroli
La Lumo, kiu devas lumigi
La Vivo, kiun oni devas vivi
La Amo, per kiu oni devas ami
La Ĝojo, kiun oni devas disdonadi
La Pano de la vivo, kiun oni devas manĝi
La malsatulo, kiun oni devas satigi
La soifanto, kiun oni devas trinkigi
La nudulo, kiun oni devas vestigi
La senhejmulo, kiun oni devas gastigi
La malsanulo, kiun oni devas kuraci
La solulo, kiun oni devas ami
La neatendato, kiun oni devas akcepti
La leprulo, kies vundojn oni devas pansi
La almozulo, kiun oni devas pridonaci ankaŭ per rideto
La alkoholulo, kiun oni tolereme aŭskultas
La psik-malsanulo, kiun oni devas gardi
La infaneto, kiun oni devas brakumi
La blindulo, kiun oni devas konduki
La mutulo, kun kiu oni devas paroli
La kriplulo, kun kiu oni devas iri
La narkotulo, al kiu oni devas doni amikecon
La putino, kiun oni devas liberigi de la danĝero kaj help-apogi ŝin
La malliberulo, kiun oni devas viziti
La maljunulo, kiun oni devas priservi

*Por legantoj de Dio Benu tradukis*
*Mag. Stanisław Śmigielski, Pollando*

## LEVU LA OKULOJN

Levu l´ okulojn al l´ monto,
kie troviĝas la fonto
de daŭra beno kaj paco,
tie estas Di´ de graco.

Li lumigos vian vojon
kaj certe ĉiun la fojon,
kiam tra l´ val´ vi trapasos,
vin Li neniam forlasos.

Pro la Dia rolo garda
Li neniam estos tarda,
kiam helpon bezonas vi,
apud vi ĉiam staros Li.

Levu l´ okulojn al l´ monto
al nesekiĝebla Fonto,
Li donos al vi abunde
kaj satigos vin ĝisfunde.

*Past. Olubunmi Osho-Davies, Niĝerio*

el "DIO BENU" Nro 43.

## ŝanĝoj en la Poŝto

Bonvolu pardoni la malfruon en la ricevo de la la lasta bulteno kaj de tiu bulteno . Fakte oni devas refari novajn kovertojn por nia bulteno , laù la novaj poŝtaj francaj leĝoj . Ni fakte uzis la reston de la malnovaj kovertoj.
Mi esperas ke la venonta bulteno Nro 217 aperos akurate . Ni dankas Vin pro via kompreno.

La redaktoro

## Kotiztabelo 2003

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 25 eùroj
Peranto : S-ro PONS Roger
Rue du 8 Mai 1945
87510 NIEUL.
al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de S-ro Pons

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto"
unuopulo : 10 eùroj
geedza paro : 13 eùroj
gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : 5 eùroj
bonfaranto : 30 eùroj

Pagu al la kasisto :S-ro VILLENEUVE G.
14,Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
al kiu vi sendos ĉekon je la nomo de Association Catholique Française pour l'esperanto

Dépot légal : 1er trimestre 2003 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO